**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

JARA ABONO

30,- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69
Pĉk. Nürnberg
819 56-851



N-ro 35/77 - 6 sep 1977
Aperas ĉiusemajne

## Kongresaj impresoj en Ĉenstoĥovo

## El la vojaĝa taglibro de D-ro J. Kondor

17.8.77 - Sur la Hela Monto jam celebris la sanktan meson la Episkopo de Ĉenstoĥovo, Francisko Musiel, en la Mirakla Kapelo, kune kun ĉ. 40 sacerdotoj. Belege gvidis la kantadon pola pastro Zielonka, laŭ la zorge kompilita Kongresa Preĝaro. - Dum la Interkona Vespero en la Kapelo de S. Jozefo, apud la preĝejo, precipe polaj geartistoj, prezentis sian grandan talenton diversmaniere kaj ankaŭ inter ili pleje eminentiĝis per sia arto popola s-ino Zuzanna Kawulok el Istebna (regiono Jablonka, suda Pollando). Ŝian puran, bonege kompreneblan, inteligentan parolon en Esperanto kaj belegan ludadon sur diversaj paŝtistaj muzikinstrumentoj ĉiuj kongresanoj certe kore ĝuis! (Oni devus ŝin kaj ŝian montaran grupon foje inviti al Okcidento por ke ĝi lernu de ŝi kaj ŝia grupo vere popolan muzik-kulturon!). Tre bone sukcesis ankaŭ la deklamo de s-ino Stiens pri la Statuo el porcelano.

18.8.77 - Je la 9-a horo estrarkunsido, dum kiu ni ekscias, ke Lia Kardinala Moŝto Wojtila ne povos celebri la Sanktan Meson, ĉar li devas partopreni en la funebra ceremonio de alia pola episkopo, Baranek, antaŭ tagoj mortinta, en Poznan.

En la solena malferma Sankta Meso precipe plaĉis al mi la bonega prediko de la episkopo de Ĉenstoĥovo, kiun ĉiam perfekte tradukis, de frazo al frazo, pastro pola. Li esprimis la ĝojon, ke en Pollando ok novaj preĝejoj povos esti konstruataj kaj ke la nombro de la novaj pastroj konstante kreskas.

Dum la Solena Malfermo delegitoj de diversaj landoj salutas la kongreson. La pola katolika presagentejo ĉeestas. P. Ruaro, redaktoro de Espero Katolika, laŭtlegas la telegramon de la Papo, de kardinalo Wyszinski, hungara kardinalo Lékai, Radio Vatikana, UECI, CO, d-ro J. Hamvai kaj leteron de d-ro Halbedl. Festparolis d-ro Biedulski, prezidanto de IKUE. Li precipe ĝojis, ke la IKUE-kongreso unuan fojon povis okazi sur pola tero! Kaj en tiel bela loko, kia Ĉenstoĥovo!

Por la Estraro - post komuna fotografado - estas aranĝita komuna tagmanĝo en la monaĥejo de la Paŭlanoj.

Ĉar la speciala kongresa stampilo nur en tiu ĉi tago funkciis en la poŝtoficejo, mi rapidis post tagmanĝo al la ĉefpoŝtejo kaj stampigis multajn bildkartojn pri la Nigra Madono, pere de s-ano Biesiada, kiu faris ĝin tre volonte, ĝentile. Pli poste la plej multajn bildkartojn mi disdonis donace inter miaj hungaraj geamikoj por fari al ili iom da ĝojo.

Je la 15-a horo prelegis s-ro P. Ruaro pri: Esperanto en la evangelizado kaj homa progreso. Anstataŭ P. Casnoves el Hispanujo prelegis alia kapuceno. Je la 17-a horo kelkaj landaj reprezentantoj raportas pri la IKUE-agado en siaj respektivaj landoj. La hungara Németh Anna lerte raportas pri la hungara agado kaj ni ekscias el ŝia parolo, ke la budapeŝtanoj diligente kunvenas ĉiumonate en la Kristo-Reĝo-preĝejo.

Vespere, je la 19,30 horo, Arta Vespero en la Nacia Filharmonio, kun grandega sukceso. La infankoruso "Liuto", Remigius Kossakowski, Pjotr Rowinski, iu pianvirtuozo el Varsovio, estis simple grandiozaj! Fine P. Biedulski dankas al la aranĝintoj de la Arta Vespero kaj al s-ro

(Daŭrigo sur p.2)

Kongresaj impresoj (daŭrigo)

Novogrotzki, kiu lertege, delikate ornamis la salonon per surskriboj kaj naciaj flagoj.

Vespere mi ĝoje kaptis Polan Radion, kiu detale kaj objektive raportis pri la Solena Malfermo de nia 37-a IKUE-kongreso.

19.8.77 - Celebras la Sanktan Meson episkopo B. Miziolek el Varsovio, eklezia kuratoro de Pola Katolika Esperantistaro, kune kun ĉ. 50 pastroj el diversaj landoj, en la Baziliko de Hela Monto.

Ĉ. tagmezo komenciĝas la Ĝenerala Kunveno, kiu fine unuanime akceptas la renovigitan statuton.

Amason da bildkartoj pri la Nigra Madono mi rericevis de s-ano Biesiada, kiu afable provizis ilin per speciala stampaĵo, kiun la kongreso rajtis uzi nur dum unu tago kaj nur en la ĉefpoŝtejo (Malbona solvo, sed pli bone ol se nenio estus okazinta!) . La plej grandan parton de tiuj ĉi unikaj bildkartoj kun speciala stampaĵo mi tuj disdonis inter la hungaraj gesamideanoj, por ke mi faru al ili ĝojon.

Hodiaŭ mi tagmanĝis en hotelo "Patria", ĉe la piedoj de Hela Monto, kun pastro itala, s-ano Pellis, kiu rakontis poste, en sia ĉambro hotela, ke la itala karavano devis atendi ĉe la ĉeĥa-pola landlimo pli ol 6 horojn!

Vespere denove Arta Programo en la Filharmonio. Mi ĉion surbendigis. Mi nur bedaŭras, ke la unuan Artan Vesperon mi ne surbendigis, tamen mi ĝojas, ke almenaŭ unu vesperon mi sukcesis kapti per mia Telkaradio! La programon gvidis s-ino Jadwiga, aktorino el Krakovo. Elstaraj punktoj estis: Ĥoruso "Muzilo", Jablonka-infanoj (eble 70-80 infanoj en bunta popola kostumo el la regiono de Karpatoj!) kun admirinde belaj popolaj dancoj kaj kantoj, kantisto el Varsovio kun basa voĉo (li kantis Misisipo). Fine infano pola belege, kortuŝe deklamis pri monaĥa frato, kiu metis ĉiun sian fidon en la Dipatrinon Maria!

20.8.77 - Hodiaŭ, sabate, okazas primica meso de Esperanto-novsacerdotoj sub la gvido de tri episkopoj en la Mirakla Kapelo. Ĉiam amaso da homoj en la preĝejo, ne nur esperantistoj, sekve granda propagando por nia Internacia Lingvo! Posttagmeze en aŭtobusoj ni vizitas la urbon Ĉenstoĥovo kaj konstatas, ke la diversaj novaj preĝejoj de la konstante kreskiĝanta , bela, industria urbo estas zorge flegitaj, kiu pruvas la amon de la polaj fidelulojn al nia Eklezio! En iu urboparto ni ĝoje legis sur domo: ul. Zamenhova. Do ankaŭ en Ĉenstoĥovo ekzistas Zamenhof-strato!

Vespere mi rigardas diversajn filmojn pri la pilgrimoj al Ĉenstoĥovo (en koloro!), kun Esperanto-parolo, fare de s-ano P. Rowinski (kiel mi aŭdis de polaj geamikoj), kiuj laŭ bilda tekniko estis eminentaj, grandiozaj, sed la voĉo estis ne ĝuebla pro akustikaj malfacilaĵoj de la salonego!

21.8.77 - Dimanĉe, okazas la dank-diservo, sub gvido de roma episkopo kaj kun prediko de p. d-ro Biedulski. Granda amaso da pilgrimantoj ĉeestis, ankaŭ fremdaj homoj, ĉar dimanĉe ĉiam amase alvenas novaj pilgrimantoj el la lando!

Memore pri Ĉenstoĥovo mi aĉetas grandan Maria-bildon en "Veritas" kaj surstrate du belajn bastonojn, ĉizitajn de polaj paŝtistoj de la montaro! De P. Biedulski mi ricevas belan medalon pri la Hela Monto kun Nigra Madono, kun Esperanto-surskribo: Hela Monto - 37-a Kongreso de IKUE - Ĉenstoĥovo 17.-21.08.1977 - rekone pro miaj kontribuaĵoj (?).

Posttagmeze amika kunveno en la loĝejo de familio Novogrotzki kun familio Stiens. S-ino Stiens kantas kaj deklamas por mia Telkaradio, kiun mi nun ĉiam povas kun plezuro reaŭskulti! (Statueto el porcelano... kaj pola popola kanto, kantita kun s-rino Barbara Novogrotzka). Doro-

(daŭrigo sur p. 3 )

Kongresaj impresoj (daŭrigo)

thea, la ĉarma filino de ges-roj Novogrotski kantis ŝerckanton pri sovaĝokcidenta bovpaŝtisto.

Vespere mi bonege kaptas Radion Vatikanan sur meza ondo (kiel en Germanujo!).

22.8.77 - Lundo estas la tago de nia reveturo el la bela lando de nia 37-a IKUE-kongreso!

***************************

Esperantistoj, kiuj interesiĝus pli detale pri la Nigra Madono kaj ĝia historio, legu afable la belegan, bonege kompilitan Kongresan Libron de nia 37-a IKUE-Kongreso! Precipe du ĉapitrojn mi rekomendas al la legantoj: Reĝino de Pollando kaj Kio ligas nian landon kun la mondo?

En la konvinko, ke niaj karaj polaj gefratoj ĉion eblan faris en la intereso de la kongresintoj, mi korege dankas al la IKK pro la grandioza laboro kaj deziras, ke la fruktoj de tiu ĉi unika kongreso multobliĝu en la sekva IKUE-kongreso en Luksemburgo!

Dio benu la amatan polan popolon, al kiu similan mi ne vidis en la mondo! Tiu ĉi popolo, kiu tiel grandan honoron kaj amon al la Dipatrino havas, ne povas perei, sed floros konstante. Prave skribis gubernatoro Frank, la terura ekzekutisto en Pollando, en sian memorlibron:

"Ŝajnas, ke jam ĉiuj steloj estingiĝis super Pollando, tamen restis ankoraŭ unu granda lumo sur la Hela Monto. Ĝis kiam tiu lumo ne estingiĝos, ĝis tiam nia venko ne estos plena kaj ni devas pri tio ĉi memori." (Dziennik H. Franka, Warszawa 1956)

Dr. J. Kondor, Neuwied

***************************

Reagoj de legantoj

Pri Bona Espero

Dank' al miaj bonaj geamikoj mi havas de tempo al tempo okazon legi Vian tre interesan informilon. Kion ĝi signifas por Esperanto-aktivulo mi ne volas ĉi tie argumenti, ĉar tio estas ja evidenta afero. Mi nur volas simple esprimi al Vi mian sinceran gratulon, koran dankon kaj bondeziri al Vi kiel eble plej multe da sukcesoj en Via utilega kaj modela agado por la afero de internacia lingvo.

Legante detale ĉiun akireblan ekzempleron de Via eldonaĵo, mi rimarkis, ke Vi jam kelkfoje raportis pri "Bona Espero", - la afero tre interesas min, ĉar ekde la pasinta aŭtuno, ĝis februaro ĉi-jara estadis tie mia najbarino, "nevino" kaj Esperanto-lernantino, juna studentino de fiziko, Teresa Zabawska. Ŝi instruis en "Bona Espero" al la knaboj-lernantoj fizikon, memkompreneble en la internacia lingvo. Mi havis la egan plezuron (kun iom da prava fiero) legi ĉiujn ŝiajn ampleksajn leterojn senditajn al ŝia patrino....

Post travojaĝo de Paragvajo, Ĉilio, Peruo ŝi atingis Alaskon, kie ŝi estados ĝis la fino de tiu ĉi monato. Nun ni malpacience atendas pluan ŝian leteron kun eventualaj ŝiaj novaj planoj. Ŝi ekiris sian mondvojaĝon kun granda entuziasmo kaj espero, renkonti en la mondo sincerajn, bonkorajn homojn, - kaj ŝia entuziasmo daŭre kreskadis, ĉar ŝi vere renkontis ilin. Pri tiuj ĉi travivaĵoj ŝi plenigis kvar dikajn taglibrojn. En la ĉefurbo de Alasko ŝi gvidis Esperanto-kurson por progresintoj. Ankaŭ pri tio ŝi skribis kun sincera ĝojo, kaj eĉ kun fiero.

Ne eblas en kelkaj vortoj transdoni la enhavon de 30 ampleksaj kaj ege interesaj leteroj. Menciinda estas ankaŭ la fakto, ke ŝiaj leteroj rondiras inter ĉiuj familianoj, gekonatoj kaj universitataj gekolegoj, kio grave helpas krei ĝustan opinion pri la internacia lingvo Esperanto kaj pri ĝia valoro en la internaciaj kontaktoj.

Zdzisław Glajcar, Pollando



Kaj tuj ni, kara mia, per Esperanto faru "unu grandan rondon familian!"

## Kosmaj kaj aliaj novaĵoj

Gazetaro kaj televido el multaj landoj anoncis la kosman aventuron de la 2 "Voyager" kaj menciis, ke la usonaj maŝinoj kunportas i.a. mesaĝon en Esperanto.

Tri francaj ĵurnaloj, "La Voix du Nord" (19.8.77), "Nord Eclair" kaj "Nord Matin"(21.8.77) aperigis detalan artikolon pri la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko, i.a. kun mencioj pri ĉefaj radio-elsendoj en Esperanto.

"Nord Eclair" kaj "Nord Matin" publikigis foton pri la Pola Esperanto-Teatro kaj "Voix du Nord" aperigis desegnon de Peynet, kiun ni apude reproduktas. (Kaj tuj ni, kara mia, per Esperanto faru "unu grandan rondon familian"!)

Informis Lucien Giloteaux

********************************

## Dua Interlingvistika Laborkonferenco

Paderborn (pp) - De la 24-a ĝis la 27-a de novembro 1977 okazos en la Esplorcentro Paderborn, FRG, la 2-a Interlingvistika Laborkonferenco. Inter la prelegontoj oni trovas: Prof. D-ro István Szerdahelyi (Budapest), Prof. D-ro Ivo Lapenna (London), Dr. Denis Silagi (München), Claude Gacond (La Chaux-de-Fonds), Dr. Magda Saturová (Bratislava), Dr. Hans Michael Maitzen (Wien), Prof. D-ro Olav Reisøl (Oslo), Pastro Hansjörg Kindler-Triksini (Luksemburgo). Krome estos diskutoj pri plurlingvaj fakvortaroj kaj pri la laborplano de la Eŭropa Klubo. La 26-an de novembro okazos la jarĉefkunveno de tiu Klubo. La tuto okazos en la granda konferencejo de la Esplorcentro FEoLL en Paderborn. Konferencestro estas Hermann Behrmann.

La lastjara 1-a Laborkonferenco altiris preskaŭ 80 partoprenantojn. Interesuloj petu la programon de FEoLL-Institut für Kybernetische Pädagogik, Postfach 1567, D-4790 Paderborn, FRG.

## 21-a Jarkunveno de GEFA

Saarbrücken (pp) - De la 7-a ĝis la 9-a de oktobro 1977 okazos la 21-a Jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio en Saarbrücken, Kolpinghaus, Ursulinenstr. 67.

La programo antaŭvidas Esperanto-ekspozicion publikan forumon, kunsidojn, lingvajn ekzamenojn, ekskursojn kaj matineon kun jarraporto de la GEFA-estraro.

Informojn donas: GEFA-sekretario Joachim Schrapp, Schmittingheide 17d, D-4400 Münster.

*************

## Esperanto en radio

Varsovio: La neŭtrona bombo kaj la 38-a datreveno de la eksplodo de la Dua Mondmilito estis la ĉefaj politikaj temoj ĉi-semajnaj en Pola Radio. L. Kosieniak, multjara prezidanto de la ĉefa estraro de Pola Radio, kadre de Esperanto-Ekspreso interese raportis pri la IKUE-kongreso. - Pro manko de spaco ni bedaŭrinde ne povas raporti pri la aliaj stacioj!